

Se vi volus ricevi gazeton kun tre interesa teksto kaj belaj ilustraĵoj pri rimarkindaj artaj kaj naturaj belaĵoj, kaj samtempe ricevi librojn de tempo al tempo, preskaŭ senpage, abonu "Hispana Esperantisto". Adreso: J. Mangada Rosenörn. — **JACA** (Provinco Huesca) — España. Jarabono: SES pesetoj por fremdlandanoj; KVAR por samlandanoj.

Grupoj riĉigos siajn bibliotekojn aĉetante la kolektojn de la jaroj 1917-18-19-20, kiuj formas du volumojn kun multenombraj ilustraĵoj pri la rimarkindaj arkitekturaroj de **Sevilla, Burgos, Avila**, k. c. La kvar kolektoj kostas dudek kvin pesetojn (kvar dolarojn, dudek ŝilingojn, kvindek frankojn).

Pro deziro favori Esperantistojn de Orienta kaj Centra Eŭropo, ĉi tiuj povos aboni la gazeton sendonte al S-ro. F. Šilha, strato U. Karlova, 460.-Praha — Ĉeĥoslovakio - 45 kronojn ĉeĥoslovakajn.

.....

Baldaŭ aperos "FerdinandoVI, \* kaj "Farmelli", historio novelo proze kaj verse verkita de J. Mangada Rosenörn, kiun ricevos enlandaj kaj fremdaj abonantoj, kiuj estos sendintaj 25 centiman poŝtmarkon kaj unu respondkupanon respektive.

*San Antonio Valle*

# ŜIPOPHEREO

( PO EMO )

KAJ

LA ILUZIO KAJ LA TEMPO

DE

Rafael de San Millán



PRESEJO

SAN LUCAS, 5 - MADRID

2804



Federación Española de Esperanto  
Asociación Española de Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (91) - 4466079

# ŜIPOPAREO

POEMO

ESPERANTE VERKITA

DE

*Rafael de San Millán*



TIPOGRAFIO

SAN LUCAS, 5. - MADRID



Federación Española de Esperanto  
Asociación Española de Esperanto - Federacio  
Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (91) - 4466079

2804

16x0000h00280444



A  
SIPOPEREO

POEMO

Forkuru malĝojiga rememoro  
de l' malproksima jam juneco mia:  
ripozu mia dolorata koro!  
Sed ne, ĉar restas kun doloro tia  
la sola rememoro poezia.

Ĝi estas rememor' pri idilio,  
pri mia sola granda iluzio,  
belega forkurinta realeco!  
Idili' kiu iĝis elegio  
kaj maljunigis min en la juneco.

Kial min vundas rememor' kruise!  
Kial vi montras vin sufer' interna?  
Kial mi mem turmentas min sencele?  
Ha! tiam brilis la feliĉo hele  
kaj al mi ŝajnis ĝi estos eterna.

Mian animon feliĝigis amo  
la plej pura kaj ĉasta. la plej forta  
kaj la plej arda kaj pasia flamo.  
Sed ve al mil malgaja, malbonsorta!  
tio finiĝis per terura dramo.

En la naiva aĝ', kiam la vivo  
kuras trankvile tra la vojo plata  
antaŭ flora feliĉa perspektivo,  
min amis virineto delikata;  
freneze ŝi de mi estis amata.

El la mond' la plej bela kaj pasia  
mia inspir' ŝi estis, mia stelo;  
ŝia beleco estis vere dia.  
Ŝi certe sidas nun en la ĉielo  
ĉar virin' ŝi ne estis, sed anĝelo.

Mi trovis ŝin en land' intertropika,  
kie estas belega la kamparo,  
kie prosperas kreskajar' fortika  
eĉ en la plej malmola ŝton' silika  
apud la blua kaj pentrinda maro.

Inter verda arbaro kaj haveno  
troviĝis apud mar' granda bieno  
kaj meze brilis pro bongusta stilo  
palaco kun majesta peristilo  
kaj bele ĉirkaŭita de ĝardeno.

Tie ŝi estis superega floro,  
tie mi konis ŝin, kaj mia koro  
sen ia kontraŭstaro nek turmento  
feliĉe tie tremis pro amseno;  
tie min amis ŝi, mia trezoro!

Vere, mi rememoras kun admiro,  
kiel samtempe niaj koroj batis,  
la sopiron respondis la sopiro,  
kio plaĉis al mi, tion ŝi satis;  
estis kvazaŭ ordon' mia deziro.

Ĉarmaj, koregaj, tre paŝiaj scenoj  
kaj interparoladoj ne sekretaj  
inter la foliar'—dolĉaj kunvenoj—  
en la ĝarden' okazis en matenoj  
printempaj kaj agrable malvarmetaj.

Mi, obeante mian korinklinon,  
ame vizitis ĉiutage tiam  
mian preskaŭ infanan fianĉinon,  
kiu atendis post la pordo ĉiam,  
montrante sur la vang' ruĝiĝkarminon.

Kiam post galopado de l' ĉevalo  
mi ĉiutage de proksima valo  
ekvidis de l' ĝarden' la blankan muron,  
ekvidis tra kreskaja la vualo  
post krada pord' anĝelan la figuron.



Blanka kiel la blanka ŝton' marmora  
ŝi estis, paca kiel klara luno  
kaj ŝia bela kap' blondkolora  
fortege brilis kiel krono glora  
je brilegaj radioj de la suno.

Kaj kiam jam apud la virin' bela  
mi plezure forsaltis de la selo,  
ŝia okul', kiel palblua stelo,  
el eterna sidejo la ĉiela,  
sendis al mi radion de lum' hela.

Ĉu bona ĉu malbona la vetero  
ŝi min atendis ĉiam kaj bonkora,  
naive gaja, dolĉe bonhumora,  
kun ĝentila pasia maniero  
salutis min per voĉo belsonora.

Mian alvenon per ridet' ŝi festis  
kaj regis la gajec' dum ni kunestis  
--gajec' de l' juna karakter' konfida--  
tre longan tempon apud ŝi mi restis,  
sed ju pli dolĉa temp', des pli rapida.

Forflugis kiel vent' horo post horo,  
neniam ŝi kaj mi konis la dedon  
ĉar estis nia am' kvazaŭ adoro:  
en ŝia man' progresis artlaboro  
dum mi faris por ŝi belan bukedon.

Ni, konfidemaj, ĝuis estantecon:  
bonodorojn kreskajn la balsamajn,  
bluan ĉielon, sunradiojn flamajn,  
plenan sanon, junecon kaj gajecon,  
amajn rigardojn kaj parolojn amajn.

Ŝi, ne kaŝante sian aman senton  
kaj montrante al mi grandan atenton,  
estis por zorgi min senĉese preta:  
kiam mi estis iom malsaneta  
ŝia vizaĝo montris malkontenton.

Iun fojon, dum mi faris kolekton  
de floroj por buked', ne atendite  
mi ektuŝis per fingr', grandan insekton,  
kaj mia zorgo kaj lerteco spite,  
ĝi pikis min kaj flugis for subite.

Ho! kia malĝojeco, kia tremo  
en ŝi vidiĝis - pruvoj de korpremo--  
kia ploro briligis ŝian vangon,  
kun kia maldoĉec', kun kia ĝemo  
la knabino rigardis mian sangon.

Je malkvieteco plena la animo  
ŝi rigardadis min kun granda timo  
kaj el la buŝ' eliris frazoj molaj,  
sed feliĉe al ŝi estis konsolaj  
miaj gajaj rideto kaj esprimo.

Feliĉa temp' ĉi pensis ke neniam  
de l' junec' kaj feliĉe' estas la fino,  
kaj dum minacis nin l' antaŭdestino  
alproksimiĝis jam la tempo kiam  
fariĝos l' anĝelet' mia edzino.

Jam la edziĝo la sekvontan jaron  
sankte kunigos nian dolĉan paron;  
sed trudis la Fatal' mian foreston;  
pro aferoj mi devis krozi maron  
kaj por pretigi nian aman neston.

Por kio la feliĉon mi atingis  
se poste mi elportas la suferon,  
se kontraŭ mi Fatalo glavon svingis?  
Ve! apud la ĉiel' perdi l' esperon  
kaj kun la rememor' fali sur teron!

Mi adiaŭis ŝin; tiam nevole  
mi ja preskaŭ ekploris. Senparole,  
kun antaŭsent' malgaja ĉe la koro  
la anĝeleton mi kisis kormole  
kaj mi foriris plena je doloro.

Hispanlandon feliĉe mi alvenis  
kaj tre aktive kaj fervore penis  
arangĝi, solvi tuj ĉiujn aferojn,  
ĉar de l' forest' mi sentis la suferojn,  
kiuj akre senĉese min ĉagrenis.

Mi ne forlasis eĉ malgravan perojn,  
puŝata de fervoro kaj aktivo,  
kaj nur iom dolĉiĝis mia vivo  
kiam tralegis mi ŝiajn leterojn  
kaj kisis kun pasi' tiujn paperojn.

Mi ĉion aranĝinte, kun plezuro,  
deziris al ŝi flugi kiel vento,  
vojaĝi per rapida marverturo,  
ĉar jam ŝajnis al mi kvazaŭ jarcento  
ĉiu horo, minuto kaj momento.

Noktiĝis jam kiam la mara ondo  
ŝancelis la majestan ŝipon, belan,  
per kiu mi vojaĝis; lumon stelan  
la ĉiel' disvastigis tra la Mondo;  
ia lumet' de l' mar' estis respondo.

Kial kun timo mi preĝis al Dio  
kaj sentis malĝojigan antaŭsenton?  
Kaj kial mi streĉegis la atenton  
kaj kun tre maltrankvila emocio  
rigardis la kvietan okcidenton?

Lun nokton, ventego tre subita  
alportanta kun si fulmotondraron  
ondigis forte la timigan maron;  
eĉ la ferdekon ŝaŭmo disjetita  
atingis, ne trovinte taŭgan baron.

La fulm' blindigis pro la lumo brifa,  
kaj kvazaŭ brulis mia tru' pupila,  
poste mallumo regis absoluta;  
forte bolis bruege la mar' tuta,  
kaj mia koro batis maltrankvila.

Subite mi ekvidis ŝipan flankon  
antaŭ la ŝip', kaj estis granda bruo  
kaj krako de rompiĝo kaj detruo.  
Mi tuj nepre falegis sur la plankon  
pro la terura forto de la skuo.

Alia granda ŝip' estis frapita  
de mia ŝipo; ĝia flank' rompita  
la maro ĝin eniris tra la fendo,  
kaj al ni kun la vent' alvenis plendo.  
krio kaj peto kun dolor' jetita.

Mia ŝip' ne rompiĝis kaj fiere  
kontraŭstaris de l' mar' la fortajn batojn;  
l' alia pereadis senespere  
tute venkita de la ond' kolere.  
Niaj maristoj jetis la boatojn.

Por savi malfeliĉajn pereontojn  
mi saltis en boaton ektrémante;  
kuraĝe la timigajn akvajn montojn  
atakis la boat' ŝanceliĝante,  
dum la nubeg' verŝegis siajn fontojn.

La vent' muĝis frapante kvazaŭ vipo,  
kaj ĵus ekbrulis la rompita ŝipo  
kronata de tre densa nigra fumo.....  
Ho! Ve! sur ŝaŭm' aperis je ruĝlumo  
mia l' anĝel' apud flosanta ŝtupo.

Tiam, ekmirigata pro l' apero,  
ĉu realec'? --mi pensis--ĉu malvero?  
Ĝstis terure pala ŝia vango,  
ŝi kriadis kun granda malespero  
kaj ŝian blankan frunton trempis sango.

Tremante mi pro la terura sceno  
ne atentis konsilon nek admonon,  
saltis en maron kaj kun granda peno  
naĝis kaj sendis per la boĉ' konsolon.  
Baldaŭ ŝi aŭdis de la boĉ' la sonon.

Jam ŝi rekonis min, tiam lignaro  
de eksplod' estis el la fajr' jetata,  
kaj malaperis de l' supraĵ' de l' maro  
la malfortika korpo delikata  
de multepeza korp' brute frapata.

Ho, teruraĵo de l' feliĉ' ruino!  
de mia sola iluzio fino.  
Ho, la korpeto delikata, bela,  
la korp' juna de mia fianĉino  
perdita restos en la fund' malhela!

Premata malfeliĉa koro mia  
plendis ribele je la volo Dia;  
sed mi tuj, ricevinte fortan frapon  
kiu dangere vundis mian kapon,  
restis tute senmova, senkonscia.

Pro kio omi ame min forprenis  
tuj, kiam mi pro la frapego svenis,  
kaj zorge metis min sur la ferdekon?  
Hal mi devas konfesi gravan pekon:  
tiun, kiu ĝin faris, mi malbenis.

Kun plendo kaj kun ĝemo kaj sopiro  
mi pripensis--jam ĉesis la deliro--  
de ŝia marvetur' pri la kialo;  
La Fatalo--mi pensis--la Fatalo!  
La Fatal' igis min de l' am' martirol

Bezonis helpon de kuracist' lerta  
ia malsano de patrino ŝia  
nur kuracebla, kun sukceso certa,  
per urĝa kuracado hirurgia.  
Jen la kialo de l' vojaĝ' ilia.

Sed por kio ĝin scii? Malfeliĉe  
la kaŭzo estis la malbona sorto  
kiu jam suferigis min sufiĉe.  
Venu al mi la ripoziga morto  
ĉar en la kor' al mi ne restas forto;

Ho, katastrof'! vi vundis min akute,  
vi de l' eterna malĝojec' motivo.  
Same kiel la ŝip' frapita brute,  
mia feliĉo malaperis tute  
en la maldolĉa maro de la vivo.

Sed l' anĝeleto al Estaj' Supera  
petos ke mi, malgaja, senespera,  
forlasinte la vivon neutilan,  
ĝuu kune kun ŝi la Regnon Britan  
en la eterna vivo, sole vera!



## LA ILUZIO KAJ LA TEMPO

Freŝa, paca, naiva kaj alloga,  
bela, gaja kaj sana la knabino  
ĉirkaŭita de klara, verda lumo....  
kio estas al ŝi l' Antaŭdestino?

Ŝi ludas en ĝarden' flora kaj bela,  
kie regas senĉese la Printempo;  
nek sufer' nek bezono ŝin anoncas  
la rapidan kuradon de la Tempo.

Pri maljuneĉ' neniam ŝi pripensis:  
ŝi ne scias pri timo kaj doloro;  
ŝi nek ĝemis, nek plendis, kaj neniam  
ŝiajn okulojn malsekigis ploro.

Ŝi pri boneco scias kaj feliĉo,  
kaj ŝi promesas oron, povon, amon,  
longan vivadon, sanon, trankvilecon  
kaj en viv', kaj potsmorte la glorfamon.

— 15 —

La Hom' adoras ŝin kiel diomon  
kaj al ŝi rekte marŝas kun espero  
ĉar ŝi promesas, kaj la Homo pensas:  
"tio, kion ŝi diras, estas vero".

La Homo marŝas ja, sed Iluzio  
ja marŝas pli rapide, kaj per gesto  
al la Hom' montras senton simpatian  
kaj ke plaĉas al ŝi lia ĉeesto.

Ĉu tra bela florar' antaŭeniras  
ĉu tra roka krutajo l' Iluzio;  
kaj ofte l' interspacon ŝi pliligas,  
kaj la Hom' sekvas ŝin kun emocio.

Unue ĉe komenco de la vojo  
la Homo, tre konfida kaj malsperta,  
pensas ke li facile ŝin atingos,  
kaj pri sia sukces' li estas certa.

Poste li dubas; Iluzi' ŝancelas  
pri la pli taŭga voj' kaj pri la celo:  
la sun' iom post iom mallumigas,  
kaj kovrigas per nuboj la ĉielo.

L' arboj nudiĝas kaj la vento blovas,  
regas nokto, malvarmo, regas timo;  
jam plu ne povas Iluzio marŝi;  
de l' voj' de l'Iluzio jen la limo.



Iluzi' haltas, tremas kaj paliĝas;  
aperas maljunul' kun ilo fera....  
la Temp'!, kiu armita per falĉilo  
antaŭeniras kun mien' severa.

La maljunulo levas la falĉilon,  
brilegas kvazaŭ fulmo l'akra fero  
kaj post momentoj l'Iluzi' trafita  
restas sange trempita sur la tero.

Tiam la Hom', antaŭ la korp' amita  
traborita, palega kaj malvarma,  
diras al la terura maljunulo:  
"Ŝi sola estis mia revo ĉarma!"

"Mi plu sen Iluzi' ne volas marŝi;  
frapu min, maljunul'; jen mia kapo."  
La Temp': "Kiam mi volos kaj difinos  
ja nepre vin atingos mia frapo."

**FINO**

==